"Kio tio estas pri *tvinklo*?" la Reĝo demandis.

"Ĝi komenciĝis per la Te—" diris la Ĉapelisto.

"Kompreneble '*tvinklo*' komenciĝas per T" diris vigle la Reĝo. Ĉu vi volas insulti min kredigante ke mi estas neklerulo?—vi daŭrigu!"

—"Mi estas malriĉulo" la Ĉapelisto rekomencis "kaj preskaŭ ĉio pli malpli *tvinklis* post la teo, sed la Martleporo diris——"

"Mi *ne* diris" la Martleporo rapide intermetis.

"Vi *diris*—" insistis la Ĉapelisto.

"Mi tion neas" diris la Martleporo.

"Li neas 'tion'" diris la Reĝo, "do ellasu 'tion' el la evidenco."

"Nu, se ne la Martleporo, certe la Gliro diris—" kaj la Ĉapelisto ĉirkaŭregardis por vidi ĉu ankaŭ li neos—sed la Gliro nenion neis, ĉar li profunde endormiĝis.

"Kaj poste" la Ĉapelisto daŭrigis "mi tranĉis pli da buterpano——"

"Sed kion la Gliro diris?" demandis unu ĵurinto.

"Tion mi ne povas memori" respondis la Ĉapelisto.

"Se vi ne memoros" minacis la Reĝo "mi ekzekutigos vin."

La kompatinda Ĉapelisto lasis fali la tetason kaj buterpanon, kaj humile surgenuis. Denove jam la trian fojon, li komencis :—



"Mi—se plaĉas al via Reĝa Moŝto—estas tre malriĉa——"

"Konsente, tre malriĉa vi estas je la parolarto" diris la Reĝo "ĝin vi certe ne posedas."

Ĉe tiu reĝa ŝerco, unu kobajo aplaŭdis, kaj estis tuj subpremita de la oficistoj. (Ĉar 'subpremita' estas iom malfacila vorto, mi volas klarigi la agmanieron. Oni havis en la juĝejo grandan kanvassakon, kunligeblan ĉe la buŝo per ŝnuretoj. En tiun sakon oni ŝovis la kobajon, kaj poste sidis sur la sako.)

"Estas bona afero ke mi vidis tion" pensis Alicio. "Tre ofte mi legas en la ĵurnaloj ke ĉe la fino de iu proceso 'kelkaj personoj ekaplaŭdis, sed la aplaŭdantoj estis tuj subpremitaj de la oficistoj de la juĝejo.' Kaj ĝis nun neniam mi povis kompreni kion precize tio signifas."

"Se nenion plu vi povas diri pri la afero" diris la Reĝo "estas permesite al vi deiri."

"Mi ja ne povas" kontraŭdiris la Ĉapelisto deiri pli malsupren, ĉar jam mi staras sur la planko."

"Tamen vi povas *decidi desidi* tie" respondis la Reĝo.

Ĉe tio la alia kobajo aplaŭdis kaj—estis subpremita.

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEIN COLLECTION Octavo